# Sicilio 2025

Jana Zigal

*Prelego por Esperantista klubo Brno, la 26an de novembro 2025.*

Sur la bildo vi vidas insulon Sicilio , kaj dekstre estas sudorienta parto de Sicilio,kie ni feriis.

Sur la maldekstraj bildoj estas monto Etno tiel kiel ni ĝin vidis.

**La oficiala simbolo de Sicilio estas la t.n. Triskeliono aŭ Trinakrio, konsistanta el tri fleksitaj homaj kruroj elirantaj el la centra kapo de Meduzo.**

**Tiu simbolo havas antikvan originon kaj aludas al la triangula formo de la insulo kun ĝiaj tri elstaraj promontoroj.**

**La Meduzo en la centro reprezentas protektan potencon, kiu laŭ la kredo devis forpeli malbonon kaj malfeliĉon.**

**La tri kruroj simbolas senĉesan movon kaj vivenergion, kiuj karakterizas la dinamikan historion kaj kulturon de Sicilio.**

**La Trinacrio hodiaŭ troviĝas sur la sicilia flago, sur suveniraj objektoj kaj en arto, kaj ĝi estas unu el la plej konataj kaj plej malnovaj regionaj simboloj en Eŭropo.**

## Unua urbo, kiun ni vizitis estis **Katanio**

**Katanio, itale *Catania*, estas la dua plej granda urbo de Sicilio. Ĝi situas sur la orienta marbordo de Sicilio, ĉe la piedo de la vulkano Etno. Ĝi estas havenurbo kaj antikva urbo kun vasta urboplano, fondita jam en la 8a jarcento a.K. Dum sia historio ĝi estis plurfoje detruita de tertremoj kaj vulkanaj erupcioj.**
**Parto de la historia centro aperas kune kun sep aliaj urboj en la sudoriento de Sicilio en la listo de la Monda Kultura Heredaĵo de UNESCO sub la komuna nomo "Malfrubarokaj urboj en la valo Val di Noto".**

- Burgo Castello Ursino de bizanca deveno, (fondita cxirkau la jaro 800 p.K.), nuntempe en la konstruajxo estas muzeo
- Roma amfiteatro (fragmentoj trovitaj de arkeologoj sub la placo)
- **En la jaro 2002** ok siciliaj urboj — Caltagirone, Katánio, Militello in Val di Catania, Modica, Ragusa, Noto, Palazzolo Acreide kaj Scicli — estis enskribitaj inter la kulturaj heredaĵoj de la mondo de UNESCO sub la komuna nomo **"Malfrubarokaj urboj en la valo Val di Noto"**. Temas ĉefe pri urboj kun konstruaĵoj starigitaj post la detrua tertremo de **1693**.

- **Ni vizitis 5 urbojn el tiuj ok – Catania, Ragusa, Noto, Modica kaj Scikli.**

**NOTO**

**La urbo Noto, situanta en la sudorienta pinto de Sicilio, estas juvelo de baroka arkitekturo, enhavanta plurajn dekojn da palacoj, monaĥejoj kaj preĝejoj. El la konstrumaterialoj la majstroj preferis molan tofan ŝtonon, kiu donas al la urbo dum sunplena vetero ĝian karakterizan mielkoloran nuancon.**
**La rakonto de Noto komenciĝis jam en la epoko de antikva Grekio. Tra jarcentoj ĝi estis atestanto de la leviĝoj kaj faloj de diversaj civilizacioj – greka, roma, araba kaj normanda. Tamen la historia turnopunkto por la urbo estis la detrua tertremo de 1693, kiu preskaŭ tute neniigis la originan mezepokan urbon. El la ruinoj de tiu tragedio tamen leviĝis nova komenco – Noto estis tute rekonstruita kelkajn kilometrojn for, en la spirito de la tiam moderna baroka stilo.**
**La ĉefa avenuo Corso Vittorio Emanuele estas borderita de majestaj palacoj kun riĉe ornamitaj balkonoj kaj fenestroj. La nedubebla ĉefornamaĵo de la urbo estas la Katedralo San Nicolò di Mira, kies impona ŝtuparego kaj ondolinia fasado estas majstra ekzemplo de la sicilia baroko.**

## RAGUSA

**▯ Ragusa estas unu el la plej pitoreskaj barokaj urboj de Sicilio, dividita en du partojn – la pli moderna Ragusa Superiore kaj la historia Ragusa Ibla.**

**▯ Ragusa Ibla estas fama pro siaj mallarĝaj stratetoj, belaj placoj kaj riĉe ornamitaj preĝejoj, kiuj apartenas al la juveloj de la sicilia baroko.**

**▯ Post la detrua tertremo de 1693 la urbo estis grandskale rekonstruita, kio donis al ĝi sian karakterizan harmonia aspekton.**

**▯ La ĉefaĵo de Ibla estas la Katedralo San Giorgio, unu el la plej imponaj barokaj konstruaĵoj sur la insulo.**

**▯ Ragusa ofertas ankaŭ elstaran kuirarton kaj trankvilan etoson, pro kio ĝi estas ŝatata celo por amantoj de historio, arkitekturo kaj gastronomio.**

## MODICA

**▯ Modica estas historia baroka urbo.**

**▯ ▯ Modica estas dividita en du partojn – Modica Alta kaj Modica Bassa, kiuj pitoreske kuŝas en profunda valo.**

**▯ La ĉefaĵoj de la urbo estas la impona katedralo de Sankta Georgo (Duomo di San Giorgio), konsiderata majstroverko de sicilia baroko.**

**▯ Modica ofertas mallarĝajn stratetojn, historiajn palacojn kaj panoramajn vidojn, kiuj allogas vizitantojn malkovri ĝian unikan etoson.**

**La urbo estas fama pro sia tradicia ĉokolado, produktata laŭ azteka metodo kun malglata teksturo.**

## SCIKLI

## CASTELO

**Cava Grande, aŭ la "Granda Kanjono", etendiĝas proksime de la sudsicilia urbo Avola. Tra ĝi fluas la rivero Cassíbile, kiu sur longo de ĉirkaŭ 10 km formas multajn lagetejojn kaj etajn akvofalojn. Post malsupreniro al la fundo de la kanjono eblas refreŝiĝi per bano en unu el la lagetejoj kaj admiri la kavernon Grotta dei Briganti en la kruta roka muro. En la kalkŝtonaj rokoj estis malkovritaj tomboj kaj homaj rifuĝejoj, kiuj estis uzataj jam en la 11a jarcento a.K. La rokoj formantaj la kanjonon atingas altecon de ĝis 500 metroj.**

**Dum nia restado ni ne nur promenis tra antikvaj urboj, vagadis en bela naturo aŭ banis nin en la maro, sed ni ankaŭ vizitis lokan fromaĝejon jak cxokolado…. Tie ni havis la eblon rigardi la tutan procezon de transformado de lakto en fromaĝon. Fine ni ankaŭ ĝuis gustumadon de diversaj specoj de la tie fabrikataj fromaĝoj.**

**En la urbo Modica estas multaj produktejoj kaj vendejoj de cxokolado, dekstre vi vidas bildo el vendejo , kie ili vendas 150 specojn de cxokolado**

Sur la pluaj bildoj vi povas iomete gxui sicilian etoson, tiel kiel ni havis eblecon vidi.

**La sicilia gastronomio estas miksaĵo de grekaj, arabaj, hispanaj kaj italaj influoj, kio kreas unikan kaj multkoloran kuirarton.**

**La insulo estas fama pro sia freŝa mara kuirarto.**

**Neapartigebla parto de la sicilia kuirarto estas tradiciaj dolĉaĵoj, kiel *cannoli*, *cassata* aŭ la ĉokolado el Modica.**

**Tipaj siciliaj pladoj, ekzemple arancini, caponata aŭ pasta alla Norma, spegulas la riĉecon de lokaj ingrediencoj, precipe tomatoj, melongenoj kaj rikoto.**

**Sicilio estas insulo, kiu ĉarmas ĉiun; ĝi estas insulo de temploj, vulkanoj, barokaj urboj kaj strandoj, kun unika etoso kaj kuirarto.**

Ĉu vi ekvojaĝas pro monumentoj, strandoj, vulkanoj aŭ bona manĝaĵo kaj trinkaĵo, vi ĉiam malkovros plian kialon por reveni ĉi tien.








# Sicilie

**říjen 2025/ oktobro 2025**

Vendrede la 24 -an de oktobro 2025 forflugis nia grupo direkte al Sicilio.
Jam fariĝis tradicio ke lastan semajnon en oktobro kelkaj anoj de grupo E-mental kune forflugas ferii en ITALIO.
Unuafoje ni tiel feriis en la jaro 2019 kaj ĉi-jare ni komune veturadis la sesan fojon.

24.10.2025 – 2.11.2025






# ITÁLIE/ITALIO



- Italio estas lando kiu troviĝas en suda Eŭropo (Apenina duoninsulo kaj multaj insuloj)
- Havas ĉirkau 59 milionoj da loĝantoj, ĉefa urbo estas Romo.
- Sicilio estas unu el 20 regionoj de Italio kaj unu el 800 insuloj, kiuj apartenas al Italio.
- Sicilio havas ĉirkau 5 milionojn da loĝantoj, ĉefa urbo estas Palermo.

| | |
|---|---|
| Abruzzo | L'Aquila |
| Apulie *(Puglia)* | Bari |
| Basilicata | Potenza |
| Benátsko *(Veneto)* | Benátky (Venezia) |
| Kampánie *(Campania)* | Neapol (Napoli) |
| Emilia-Romagna | Bologna |
| Furlansko-Julské Benátsko *(Friuli-Venezia Giulia)* | Terst (Trieste) |
| Kalábrie *(Calabria)* | Catanzaro |
| Lazio | Řím (Roma) |
| Ligurie *(Liguria)* | Janov (Genova) |
| Lombardie *(Lombardia)* | Milán (Milano) |
| Marche | Ancona |
| Molise | Campobasso |
| Piemont *(Piemonte)* | Turín (Torino) |
| Sardinie *(Sardegna)* | Cagliari |
| Sicílie *(Sicilia)* | Palermo |
| Toskánsko *(Toscana)* | Florencie (Firenze) |
| Tridentsko-Horní Adiže *(Trentino-Alto Adige)* | Trident (Trento) |
| Umbrie *(Umbria)* | Perugia |
| Údolí Aosty *(Valle d'Aosta)* | Aosta |








La oficiala simbolo de Sicilio estas la t.n. Triskeliono aŭ Trinakrio

TLP: GREEN


Palermo
Trapani
Messina
Reggio Calabria
Sicilia
Catania
Caltanissetta
Siracusa
Ragusa


Vittoria
Ragusa
Cozzo Santangelo
530
507
Avola
Noto
Modica
573
Santa Croce
Camerina
Rosolini
Scicli
Ispica
E 45
Pozzallo
Pachino







# Catania

- **Katanio**, itale *Catania*, estas la dua plej granda urbo de Sicilio. Ĝi situas sur la orienta marbordo de Sicilio, ĉe la piedo de la vulkano Etno. Ĝi estas havenurbo kaj antikva urbo kun vasta urboplano, fondita jam en la 8a jarcento a.K. Dum sia historio ĝi estis plurfoje detruita de tertremoj kaj vulkanaj erupcioj.

- Aera foto de urbo kun monto Etno en la fono
- Preĝejo de sankta Agata.
- Fontano kun statuo de elefanto – atributo de urbo, elefanto patronas urbon.







# Catania

- Burgo Castello Ursino
- Roma amfiteatro
- Fontano
- Publika parko
- Strato en centro

TLP: GREEN

# Monto ETNA

- Catania troviĝas ĉe la piedo de la monto Etna. Etna estas alta ĉirkau 3403 m, sed ĝia alteco estas ŝanĝiĝema pro tio ke Etna estas aktiva vulkano .

Etna estas la plej alta aktiva vulkano de Euxropo.













# NOTO

La urbo Noto estas juvelo de baroka arkitekturo






SANTAGĂTHA POZZILEI
FASHION CONCEPT STORE
SANTAGATHA.COM
SANTAGĂTHA POZZILEI
FASHION CONCEPT STORE


SOUVENIR





TLP: GREEN











# Ragusa

Ragusa estas unu el la plej pitoreskaj barokaj urboj de Sicilio, dividita en du partojn – la pli moderna Ragusa Superiore kaj la historia Ragusa Ibla.









Modica estas historia baroka urbo, la urbo estas fama pro sia tradicia ĉokolado.










Scicli

TLP: GREEN







# Marzamemi havenvilaĝo


Donna Nina










# Castello di Donnafugata



Castelo donnafugata
Ipogeo di donnafugata
Labirinto Castelo de donnafugata
















# Cavagrande








Dum nia restado ni ne nur promenis tra antikvaj urboj, vagadis en bela naturo aŭ banis nin en la maro, sed ni ankaŭ vizitis lokajn  fromaĝejon kaj ĉokoladejon.

En fromaĝejo  ni havis la eblon rigardi la tutan procedon de transformado de lakto en fromaĝon. Fine ni ankaŭ ĝuis gustumadon de diversaj specoj de la tie fabrikataj fromaĝoj, kaj poste multajn fromaĝojn ni aĉetis.

Alian tagon ni dum la vizito de la urbo Modica , vizitis ĉokoladejon.
Tie ni aŭdis pri la historio de produktado de ĉokolado en la urbo Modica. Poste ni gustumis diversajn specojn de loka ĉokolado.



Aula agrituristica
Farm classroom
CHEEStai?
AZIENDA DIDATTICA
Latte Mio


Oro Antico
Cioccolato di Modica I.G.P.
Menta selvatica
Wild Mint
Gelsomino
Noci
Carruba
Vaniglia
Mandorla
2,79
Cacao 60%

Creme spalmabili
IL MODICANO
Organic Chocolate
CLASSICO
BIOLOGICO



SICILIANE
amazon
Etsy
INFO: 328 - 4439961
SPEDIZIONI IN TUTTO IL MONDO
WORLDWIDE SHIPPING AVAILABLE

Ceramiche di Caltagirone
Alemanna
Giorgio & Ivano
CALTAGIRONE
Artisti e Artigiani
Artists and Craftsmen
Produciamo dall'argilla al prodotto finito e personalizzato.
Oggetti d'arredo - piastrelle - pietra lavica - stoviglierie.
Spedizioni assicurate in tutta Italia da € 20,00
Shipment insured all over the Europe from € 35,00
Shipment insured all over the world
Factory: CALTAGIRONE
www.ceramichealemanna.it

SICILY SHOWROOM





L'ARTIGIANO
since
1981


di
Caltagirone



















TLP: GREEN




















# Ĝis revido baldaŭ

- Sicilio estas insulo, kiu ĉarmas ĉiun; ĝi estas insulo de temploj, vulkanoj, barokaj urboj kaj strandoj, kun unika etoso kaj kuirarto. Ĉu vi ekvojaĝas pro monumentoj, strandoj, vulkanoj aŭ bona manĝaĵo kaj trinkaĵo, vi ĉiam malkovros plian kialon por reveni ĉi tien.




CIAO
SICILIA
VEDUTA AEREA, ISOLA DI FAVIGNANA - SICILIA